

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

Ĵaŭdon la 29-an de agosto 2019 per Skype

Partoprenis:

Mario Machlik kaj Amelie Matt (Tromsø)

Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Herman Ranæs (Trondheim)

Bård Hekland (Bergen)

Antaŭanoncis nepartoprenon Lars Sandbakk (Sandnes) kaj Claude Rouget (biciklanta ie en Germanujo)

0. Tagordo

Estis dissendita la 26-an de septembro. La tagordo estis aprobita senŝanĝe.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 17-an de junio

La protokolo estis aprobita kun kelkaj korektetoj proponitaj de Jardar.

2 Ekonomio, niaj bankkontoj kaj disponrajtoj

Herman komencis registri la estraron ĉe Brønnøysundregistret, sed ankoraŭ ne sukcesis. Mankas la subskribita protokolo de la landa kunveno. Amelie kaj Mario havigos la pretan version kaj prizorgos, ke ĝin subskribos Marianne Lund kaj Herman. Poste Herman alŝutu ĝin al Brønnøysundregistret.

La jarraporto en fina versio devas afiŝiĝi en la retejo de NEL, prefere en la membrospaco. Same la laborplano kaj jarkalkuloj. Jardar demandas al Judith, ĉu jam troviĝas versio en NE-isto, kiun oni de tie povos rekte elpreni.

Disposisjonsrett:

Styret i Norsk Esperanto-forbund gjev med dette Claude Rouget disposisjonsrett for konto 0533 05 22870 i DNB bank.

Mario faros planon kiel solvi la "kontoproblemon", interkonsile kun Douglas kaj Claude. Sufiĉas por NEL du kontoj: uzkonto kaj altintereza konto, plus la akciofondaĵo Skagen. Tri homoj havu disponrajtojn por la kontoj.

3 Postlasitaj libroj, dokumentoj de Anne Karin

Neniu cheestantoj scias, kio okazis pri la libroj.

La estraro petas al Lars havigi superrigardon kaj savi la plej valorajn esperantlingvajn librojn. Prefere la libroj estu utiligataj kaj stokitaj loke. NEL pretas pagi por sendado al Esperantonio. Jardar kontaktos la lokulojn.

4 Pago de la florkrono por Anne Karin

Jardar sciigos al la Bryne-anoj, ke ili sendu la kvitancon pri la florkrono al Esperantonia. Douglas havas aliron al la kontoj kaj povos repagi.

5 Membroregistrado

La membroregistro estis konvertita al LibreOffice antaŭ kelkaj jaroj. Kopio troviĝas ankaŭ en Esperantonia. Herman demandas al Douglas pri la stato kaj ĝisdatigeo de la datumbazo.

La estraro principe volas tiel simplan membroregistran sistemon, ke ne necesu profundaj komputilaj scioj por uzi ĝin. Ingebjørg Rambjør pretas prizorgi ĝin, se tio estas farebla sen specialaj scioj.

6 UK en Lahtio, nomumo de komitatano A

NEL sciigis retmesaĝe al la CO, ke nova komitatano estu Kjell Peder Hoff. Sed ne estis uzita la formale ĝusta formularo, kaj Kjell Peder tial ne havis voĉdonrajton dum la kunsidoj en Lahtio.

La estraro rajtigas al Mario kaj Amelie subskribi la formularon nome de NEL.

La interkonsiliĝo daŭris de 20.00 ĝis 21.15

La venonta interkonsiliĝo okazu la 3-an de oktobro je 20.30.

Protokolis Bård Hekland